

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №7



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №7 (273)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Schlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 66-67.

Abontarifo por 2017

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №7 (273).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 июля 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En tiu ĉi numero	3

Temo 5

Vytenis Andriukaitis. Zamenhof – antaŭulo de homaj rajtoj	6
---	---

Eventoj 9

Alois Eder. Politikisto kaj diplomatoj en la komuna kongreso de EEU kaj GEA	10
Zlatko Tišljär. EEU aktivis en Freiburg	12
José Antonio del Barrio. Hispana Kongreso kun rimarkinda ĵurnalista eĥo	13
Ann-Louise Åkerlund. Sveda kongreso en historia urbeto	15
Laurent Vignaud. Fervojistoj kongresis en Colmar	16
Fabrizio Valle. La 52a kongreso en Brazilo: Granda potencialo, sed ankaŭ grandaj problemoj	17
Simin Emrani. Irano: Prelegoplena kongreso	18
Tim Owen. Pensoj post la Kunkongreso en Edinburgo	19
Jozef Reinvart. Poliglotoj de la tuta mondo unuafoje en Bratislavo	21
Katalin Kováts. KER-ekzamenoj dum kvin sinsekvaj semajnfinoj	22
Svetlana Smetanina, Irina Gončarova. KER-ekzameno: La oka sesio en Moskvo	24
Ronald Schindler. Ponta Festo 2017	25
Simatani Takesi. Esperanto en solidareco de mond-civitanoj	26
Albert Stalin Garrido. Vigla Filipina junularo	26
Raffaele Del Re. La 5a Roma Festivalo	27
UEA havos novajn oficejojn en Afriko	27
Petro Chrdle. La Homo Kontraŭ Babelo	28
Vytautas Šilas. Ekspozicio de Esperantaj insignoj	29
Osmo Buller iĝis prezidanto de Taivalkoski: Intervjuo	31
ESF nomis novan Ĉefdirektoron	32
Tobiasz Kaźmierski. Poznano atendas vin	33
Koncize (9 informoj)	34

Tribuno 35

Dennis Keefe. FAFO-Merkatiko kaj ĝia limigita apliko al la Esperanto-Movadoj	36
Michael Boris Mandirola. TEJO memstara	41
Jubileoj kaj memordatoj en julio 2017	43

Urboj de Ruslando 44

Stanislav Belov. Tjumenio, komforta parto de Siberio	45
--	----

Kulturo	49
Valentin Melnikov jubileas.	50
Poemoj de Valentin Melnikov.	51
El tradukoj de Valentin Melnikov.	55
Jukka Pietiläinen. Serĉi kaj trovi amon inter ruinoj (Recenzo: Trevor Steele. <i>Amo inter ruinoj</i>)	59
Nikolao Gudskov. Homrajta brevierio (Recenzo: <i>Fundamento de la homaj rajtoj</i>)	60
Fabrizio Valle. Novaj decidoj pri <i>Heroldo de Esperanto</i>	61
Halina Gorecka. Literatura konkurso Liro-2017	62
Gazetoj ricevitaĵ en junio	62
 Mozaiko	 63
Pri kiu temas?	64
Valentin Melnikov. Versportreto 10	64
Respondoj.	64
Halina Gorecka, Aleksander Korjenkov. Dankon!	64
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	65
Kiel aboni <i>La Ondo</i>	66

Sur la julia kovropaĝo estas Tjumenio, la plej malnova rusa urbo en Siberio. Al la rakonto de Stanislav Belov (vd. p. 45-48) ni aldonu, ke en ĉi tiu urbo dum dek jaroj loĝis la redaktoro de *La Ondo*, kiu komence de la 1980aj jaroj prezidis la urban Esperanto-klubon *Revo*, kiu plu funkcias.

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2017: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>



La 28an de julio 2016 en la lingvopolitika konferenco “Perspektivoj de lingva komunikado en la Eŭropa Unio”, organizita en Nitra (Slovakio), ĉefparolis en Esperanto membro de la Eŭropa Komisiono Vytenis Andriukaitis. Unu jaron poste Andriukaitis akceptis inviton de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj la 3an de junio 2017 parolis en Esperanto en Freiburg (Germanio) antaŭ partoprenantoj de la 94a Germana Esperanto-Kongreso kaj de la samtempa kaj samloka konferenco de EEU. (Foto: Jozef Baláž, Nitra, 2016)

Zamenhof – antaŭulo de homaj rajtoj



Mi volas danki al ĉi tiu komuna konferenco de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj la Germana Esperanto-Asocio por la invito partopreni.

Ĉi-jare ni festas la centjariĝon de la morto de d-ro Ludoviko Zamenhof, pensulo, poeto kaj viziulo, la iniciatinto de Esperanto, kiu estis agnoskita de Unesko en 1959 kiel “unu el la grandaj personecoj de la homaro”. Esperanto nun aĝas 130 jarojn kaj estas en ĉiutaga uzo en pli ol 120 landoj, kaj estas pli ol 1.500 stratoj tra la mondo kiuj nomiĝas “Esperanto” aŭ “Zamenhof”. Kiel por litovo, por kuracisto kiel D-ro Zamenhof, kaj kiel por parolanto de Esperanto, estas por mi granda plezuro paroli ĉi tie.

Umberto Eco iam skribis: “Homoj ĉiam perceptas Esperanton kiel la proponon de iu ilo. Ili scias nenion pri la idealo kiu vivigas ĝin. Tamen estas la biografio de Zamenhof kiu sorĉis min. Endas pli bone konatigi tiun aspekton”.

Mi ŝatus paroli pri kelkaj aspektoj de la vivo kaj verkoj de Zamenhof. Li estis ŝatata kuracisto kaj okulisto, kiu traktis malriĉulojn senpage. La fakto ke li iniciatis la solan vivantan lingvon, kies naskiĝdato kaj loko, la 26a de julio 1887 Varsovio, estas konata, aparte de esperantistoj. Oni ofte forgesas, ke estis pli ol 900 provoj dum la historio por krei komunan lingvon por la homaro – ĉiu el ili malsukcesis krom la provo de Zamenhof! Tamen mia ĉefa temo hodiaŭ estos la pli politika atingo de Zamenhof, kiel antaŭulo de homaj rajtoj kaj kiel pasia defendanto de paco, la plej baza homa rajto. Por kompreni la kontribuon de Zamenhof en ĉi tiu kampo, endas diri kelkajn vortojn pri la historiaj cirkonstancoj en la 19a jarcento en la parto de Eŭropo de kiu li venis.

Ĝi estas demonstra versio de la 68-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Ĉe la placeto Esperanto, inaŭgurita en Teruelo okaze de la 76a Hispana Kongreso de Esperanto (vd. p. 13-15), estas kelkaj murornamaĵoj, unu el kiuj logis plurajn kongresanojn al fotiĝo. Ĉu tiaj objektoj, similaj al surmuraj memortabuloj, estas takseblaj kiel ZEOj? (Foto: Angel Arquillos)

Politikisto kaj diplomatoj en la komuna kongreso de EEU kaj GEA

Malofte altnivela politikisto vizitas Esperanto-kongreson. Tamen en Freiburg en Breisgau la 94an Germanan Esperanto-Kongreson kaj la konferencon de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) dum pentekosto vizitis Vytenis Andriukaitis el Litovio, la EU-komisionano pri sekureco de nutraĵoj, kaj li eĉ alparolis la kongresanaron en Esperanto – nu, li junaĝe lernis Esperanton kaj dum kelka tempo intense praktikis nian lingvon.

Ĉeestis ankaŭ pluraj diplomatoj delonge konataj en Esperantujo – d-ro Seán Ó Riain el Irlando, vicambasadoro en Vieno kaj prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU); Ulrich Brandenburg, emerita ambasadoro de Germanio en Moskvo, ĉe NATO (Bruselo) kaj en Lisbono; kaj Jozef Reinart, slovaka diplomato. Ĉeestis ankaŭ Zlatko Tišljar el Slovenio, la ĝenerala sekretario de EEU – kaj kompreneble la gvidantaroj de Germana Esperanto-Asocio, de la loka grupo Freiburg kaj de la regiona asocio, Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo. Entute ĉeestis pli ol 170 partoprenantoj el deko da landoj dum tiu kunveno de la 2a ĝis la 5a de junio 2017.



La ĵus emeritiĝinta ambasadoro Ulrich Brandenburg elektiĝis nova prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio. Li estas denaska esperantisto. Elektiĝis krome kiel estraranoj Barbara Brandenburg por administraj aferoj, d-ro Matthias Hecking kiel trezoristo, kaj la Germana Esperanto-Junularo sendis sian reprezentanton Cornelia Luszczek. La asocio dankis al la ĝisnuna prezidanto Sebastian Kirf, kiu post kvarjara oficado transdonis sian postenon, kaj al la estrarano Christoph Krick, kiu ankaŭ retiriĝis el la GEA-estraro.

La kongrestemo “Paco kaj Milito” amplekse kaj profunde okupis la kongresan programaron. Pri ĝi temis la ĉefprelego de Jomo Jpfelkofer jam sabaton matene. Posttagmeze Jürgen Grässlin, estro de la Armadinforma buroo (RIB) en Freiburg, raportis detale pri la armilproduktado en Germanio; li prelegis germanlingve kaj Esperanten interpretis Ursula Niesert. Poste Alois Eder analizis la kaŝan pormilitan kaj la malkaŝan porarmilan propagandon, kiu uzas la psikologian rimedon de la “signifokadroj de vortoj” (neŭrolingvistike nomata “framing”). Pri la sekvoj de vortuzado avertas jam la juda saĝotradicio: “Atentu pri via vorto, ĝi finfine fariĝos via sorto”.

Prezentiĝis la ĝemelurboj de Freiburg (aparte kie ekzistas Esperanto-kontakto), kaj detale raportis Petro Zilvar kaj Zsófia Kóródy pri la tre vigla urbopartnereco de

la Esperanto-urbo Herzberg/Harz kun siaj partner-urboj. Kunsidis ankaŭ la politikaj asocioj esperantorilataj: la Verduloj (AVE, kunlaboranta fakasocio de UEA pri eko-logio), kaj EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto).

En samtempe sendata radioprogramero kern.punkto.info Johannes Mueller kaj Eva Fitzelová bonvenigis sur la podio du gastojn kompetentajn pri eŭropa politiko: la novbakitan GEA-prezidanton Ulrich Brandenburg kaj la irlandanon Seán Ó Riain. La publiko vigle kundiskutis. Ankaŭ aŭskultantoj el la tuta mondo uzis la eblecon rete komuniki sian opinion, kiun laŭtlegis la “advokato de la publiko” Julia Noe. Jozef Reinvar kaj Zlatko Tišljar substrekis en la diskutado, kiom gravas edukado por atingi eŭropan identecon. Diskutanto tiucele postulis komisionojn de historiistoj, kiuj harmoniigu la lerneajn historilibrojn nacieme skribitajn.

Grava fundamento por la paco en la mondo estas religia paco. Tiucele lundon antaŭtagmeze okazis podia diskuto inter fideluloj de ses religiaj komunumoj kaj mondkonceptoj: romkatoliko Albrecht Kronenberger, protestanto Hans Böheim, islamano Amina Feder, bahaano Robert Springmann, budhisto Manfred Westermayer, kaj humanisma liberpensulino Wera Blanke. Vigle partoprenis en la interŝanĝo de kredoj ankaŭ la publiko. Judino tre interesita pri la temo troviĝis en la diskutanta publiko.

Beligis la kongreson Esperanto-muziko. La juna rep-regea muzikisto Jonny M el Germanio kaj la grupo *Kaj tiel plu* el Katalunio prezentis sian arton, unue en moderna kaj poste en popolece katalunia stilo.



Dimanĉe posttagmeze okazis pluraj ekskursoj. Kelkaj kongresanoj vizitis la malnovan urboparton de Freiburg, aliaj rigardadis la novan ekologie kaj sociale elstaran urbokvartalon Vauban. Pliaj ekskursoj gvidis al la atomcentralo Fessenheim, je nur 25 km de Freiburg, al la muzeo Unterlinden en Colmar, Francio, kaj al la proksima monto Schauinsland (elparolu: ŝaŭinsland; la vorto signifas: “rigardu en la landon”).

La Esperanto-Ligo de Baden-Württemberg (BAVELO) decidis streĉi siajn fortojn por diskonigi Esperanton en lernejoj. Ĉiu lernanto almenaŭ unufoje dum sia lernado aŭdu iom pri Esperanto. Nur se li aŭ ŝi scias pri Esperanto, eblas decidi, ĉu lerni la lingvon, ekzemple per reta kurso. Scii iom pri Esperanto ankaŭ apartenas al la ĝenerala scio, kiun lernejoj transdonu pri la mondo.

La riĉa libroservo ankaŭ entenis Esperanto-lernolibrojn por turkoj kaj por araboj. Ĉu Esperanto iam estos rimedo por integriĝo?

Alois Eder

EEU aktivis en Freiburg

De la 2a ĝis la 5a de junio en la germana urbo Freiburg okazis Germana Esperanto-Kongreso, kaj paralele tie okazis ankaŭ Eŭropa Konferenco organizita de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj jaraj regulaj kunvenoj. La konferenco havis la titolon “Zamenhof kiel antaŭulo de homaj rajtoj” kaj estis dediĉita al la 100-jara datreveno de la morto de tiu granda humanisto.

La estraro de EEU invitis kiel ĉefparolanton en la konferenco d-ron Vytenis Andriukaitis, eŭropan komisionanon pri sano, kiu afable akceptis la inviton kaj iĝis la ĉefa gasto de la konferenco kaj de la kongreso. La konferencon malfermis la prezidanto de EEU Seán Ó Riain, kaj poste parolis d-ro Andriukaitis, kies kompleta parolado en Esperanto kaj en la angla jam aperis en la retejo de Eŭropa Komisiono (vd. p. 6-8). Sekvis la paroladoj de Ulrich Brandenburg, Jozef Reinvar kaj Zlatko Tišljar. Fine la prezidanto de EEU proklamis d-ron Andriukaitis honora membro de EEU.

Post la konferenco la nova estraro de EEU havis kunsidon kun la komisionano pri la eblecoj kiujn la Eŭropa Komisiono havas por antaŭenigi Esperanton en Eŭropa Unio. En Freiburg okazis ankaŭ elekta kunsido de la asembleo de EEU, kiu elektis novan estraron por la trijara mandato inter 2017 kaj 2020. La nova estraro konsistas el kvin membroj: Seán Ó Riain kiel prezidanto, Flory Witdoeck kiel vicprezidantino kaj financa prizorganto, Zlatko Tišljar kiel sekretario, Ulrich Brandenburg kaj Jozef Reinvar kiel membroj.

Okazis ankaŭ ĝenerala kunveno, kiun gvidis EEU, kaj kies temo estis “Lingvaj perspektivoj en Eŭropa Unio post Briteliro”. Krome Maja Tišljar prezentis al ĉiuj kongresanoj projekton, kiun financas EU kaj efektivas EEU kun kvar aliaj partneroj.

Zlatko Tišljar

Hispana Kongreso kun rimarkinda ĵurnalista eĥo

Inter la 23a kaj 25a de junio disvolviĝis en Teruelo (Teruel, suda Aragono) la 76a Hispana Kongreso de Esperanto. Fakte, la kongresaj aktivadoj daŭris multe pli longe: jam dum tuta semajno, ekde la 19a, okazis en Teruelo diversaj aktivadoj por la loka loĝantaro kaj poste por la plej fruiĝantaj vizitantoj, kaj samtempe aliaj prezentadoj estis organizitaj en Madrido kaj la regiona ĉefurbo Zaragozo. Post la fino de la kongreso la restantaj kongresanoj povis labori per du seminarioj: unu por aktivuloj kunlabore kun UEA laŭ la modelo de la Aktivula Maturiĝo, kaj alia organizita de TEJO kun HEJS, la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio (HEF), por la projekto ECY, subvenciata de la Eŭropa Unio.

La Kongreson partoprenis 150 homoj el pli ol 20 landoj.

Kiel ni anoncis en la aprila numero de *La Ondo*, Teruelo estas la plej malgranda provinca ĉefurbo de Hispanio; ĝi varme akceptis la okazigon de la Kongreso, des pli ke dum tiu ĉi jaro oni kunmemoras la 800an datrevenon de la plej fama ama legendo en Hispanio, tiu pri la Geamantoj de Teruelo. En ties celebrado la urbestro inkludis nian kongreson. Krome, la loka estraro akceptis doni la nomon Esperanto al placeto situanta fronte al la loko, kie komenciĝis la kursoj de la lingvo en la urbo; formalan malfermon de la ŝildo kun la nomo ĉeestis la skabeno pri kulturo. Ankaŭ la regiona registaro montris apogon, interalie, per partopreno de la Ĝenerala Direktoro pri Kulturo kaj Heredaĵo en la publika prezentado okazinta en Madrido.

Inter la plej gravaj programeroj oni povas citi la prezentadon de la traduko al la



La novinaŭgurita placeto Esperanto (Foto: Carlos Pesquera)

hispana lingvo de la libro de Roman Dobrzyński *La Zamenhof-strato*, dialogo kun la nepo de D-ro Zamenhof, Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, kiu fariĝis la pinto de la celebrado de la Jaro Zamenhof fare de HEF. La prezenton ĉeestis la aŭtoro, danke al la kunlaboro de la Pola Instituto pri Kulturo en Madrido, kies reprezentanto pri kulturo ĉeestis la kongreson kaj alparolis la publikon en senriproĉa Esperanto. Aliaj prezentaĵoj de la libro por la ĝenerala publiko okazis en Madrido kaj Zaragozo.

En la kongreso prezentiĝis du aliaj libroj en Esperanto, la tradukoj respektive de *La defio vivi kaj krei*, teatraĵo pri la aragona kinreĝisoro Luis Buñuel, kaj de *Tagoj kaj ruinoj*, impona taglibro de la fama kataluna esperantisto Jaume Grau Casas, verkita en la koncentroj de suda Francio post la hispana interna milito. Ambaŭ tradukoj ŝuldiĝas al la poeto Miguel Fernández, kiu ankaŭ prezentis novan poemon honore al la Geamantoj de Teruelo kaj publike deklamis ĝin ĉe la piedoj de ilia impona Maŭzoleo. Alia omaĝo koncernis la esperantistan pioniron, arkitekton kaj socialistan politikiston Francisco Azorín Izquierdo, naskiĝintan en la Teruela provinco kaj forpasintan en la ekzilo en Meksiko, kun ĉeesto de lia nepo Ernesto Azorín, kaj partopreno de interalie la loka historiisto Serafín Aldecoa kaj la prezidanto de Meksika Esperanto-Federacio Mallely Martínez.

En la muzika flanko oni devas noti la partoprenon de la rekuniĝinta ensemblo *Kajto*. Ilia koncerto, en kiu ankaŭ partoprenis Martin Wiese, disvolviĝis en tre antikva tradicia gastejo "Fonda del Tozal".

Inter aliaj programeroj estis: astronomia observado, ekskursoj en la urbo mem kaj en la apuda historia Albarracín, KER-ekzamenoj, kursoj, prelegoj, kaj diversaj aktivadoj kun rilato al la Batalo de Teruelo, unu el la plej ferocaj dum la hispana enlanda milito, kies spuroj ankoraŭ videbliĝas en la urbo.

Kajto koncertas en Teruelo (Foto: Angel Arquillos)



Rimarkinda estis la informa flanko de la Kongreso. La lokaj komunikiloj informis ofte pri la Kongreso, jam dum la antaŭaj semajnoj, kaj ĉefe la ĵurnalo *Diario de Teruel* ĉiutage aperigis longajn artikolojn kun resumo de la aktivadoj, plus la tagan programon. Ankaŭ la lokaj radioj kaj la regionaj ĵurnaloj informis pri la Kongreso kaj intervjuis la prezidantojn de la loka kongresa komitato, Alberto Granados, aŭ de HEF, José Antonio del Barrio.

Sed la plej frapa gazetara rezulto estis la publikigo, la tagon de la inaŭguro, de intervjuo al Miguel Fernández kaj de artikolo verkita de José Antonio del Barrio, kiuj okupis la tutan dorsopaĝon, tute en Esperanto; legantoj povis trovi la tradukon en la hispana alirante la retejon de la ĵurnalo. Tiu estas verŝajne unuafoja publikigo en profesia normala gazeto.

La kongreson organizis la loka asocio *Liberanimo*. Ĉi tiu grupo estas tre juna, kaj formale komencis agadi antaŭ nur iom pli ol unu jaro. Temas tamen pri tre serioza grupo de sociaj aktivuloj kun ampleksa sperto en socia aktivado kaj celkonscia entreprenemo, kiu jam disvolvis tre interesajn iniciatojn, tiel ke, kompare kun la loĝantaro de la urbo, oni povas konsideri ĝin kiel unu el la plej aktivaj en la lando. La perspektivoj de pluagado en la urbo kaj la provinco montriĝis tre pozitivaj.

La venontjara hispana kongreso okazos en julio 2018 en Madrido, parte konekse kun la ILEI-kongreso, kiu disvolviĝos en tiu urbo unu semajnon antaŭ la Unversala Kongreso de Lisbono.

José Antonio del Barrio

Sveda kongreso en historia urbeto

Ĉi-jare la Sveda Esperanto-Kongreso okazis en la malgranda historia urbeto Forsvik, okcidente de la granda lago Vättern. La urbeto situas ĉe kluzo en la tre grava Gotia Kanalo, kiu estis konstruita komence de la 19a jarcento kaj konektas la orientan kaj okcidentan marbordojn de Svedio. Nuntempe la kanalon uzas precipe plezurŝip(et)oj.

Dum 600 jaroj Forsvik estis grava industria urbeto, kies muelejo, segejo kaj forĝejo uzis la energion de la akvotorentoj por sia funkciado. Ĝis 1970 funkciis la maŝinindustrio, kiu produktis diversajn objektojn el fero. Ni tranoktis en la eksa laborista loĝdomo kun aŭtentaj apartamentoj kaj havis la jarkunsidojn de kvar el niaj landaj Esperanto-organizoj en la oficejo de la uzino.

Ĝi estas demonstra versio de la 68-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Fine de majo la suma kvanto de la homoj, kiuj eklernis Eon ĉe la retejo Duolingo, superis milionon; unu monaton poste la kvanto de lernantoj en la anglalingva kurso estas ĉ. 911.000 k en la hispanlingva ĉ. 150.000. La sekva lingvo, en kiu aperos la E-kurso de Duolingo, estas la portugala, jam preskaŭ 20.000 homoj aliĝis por partopreni la kurson, kiam ĝi haveblos. (Libera Folio)

Dum la internacia libro-foiro de Jerusalemo (11-15 jun) ĉe E-budo oni disdonis centojn da flugfolioj, vendis dekojn da libroj (plej furoris *Bridge of Words* k *La Eta Princo*), organizis debaton “Eo kaj la Ideo de Internacia Lingvo” k akiris dekojn da novaj amikoj k simpatiantoj, inter kiuj estis ret-lernantoj de Eo. (Landa Agado)

Eo estas unu el la lingvoj elektitaj por la Lingva Diverseca Defio de iTalk k Wikitongues. (Landa Agado)

1 jun 2017 d-ino Vera Barandovská-Frank k d-ro Giorgio Silfer prelegis, invite de la societo Slava Unio, en la unua konferenco pri interslava lingvo, okazinta en Stare Mesto (Moravio), komence de festivalo pri slavaj artoj. (HeKo)

En scienca konferenco “Por pli bona leciono”, organizita 26-27 maj en la Pedagogia Instituto en Havano, partoprenis kvar e-istoj (Pedro Fernández, Vilhelmo Lutermano, Julián Hernández, Maritza Gutierrez) kiuj prezentis E-librojn, respondis demandojn pri Eo, deklamis k kantis en Eo. (Landa Agado)

4 jun en sia pentekosta eldono la revuo *Kirche und Leben* (Eklezio kaj vivo) de la diocezo Münster (Germanio) aperigis tutpaĝan artikolon *Betan auf Esperanto* (Preĝi en Eo). (Esper-german)

Je 29 jul 2017 al la 102a UK, kiu okazos ĉi-somere en Seulo, aliĝis 1125 personoj el 51 landoj; plej multe (242) el la kongreslando Koreio, sekvas Japanio 186, Ĉinio 133, Francio 85, Germanio 36, Brazilo 35, Ruslando 31, Pollando 25, Usono 25, Nederlando 24. (uea.org)

Danke al iniciatemo de la rehejmiĝinta svisa e-isto Christian Darbellay – vivinta k aktivinta 39 jarojn en Germanio – 13 maj en la Svislanda Kantono Valezo fondiĝis Valeza E-Klubo (VEK); pri tio informis la loka ĵurnalo *La Gazette de Martigny*. (Esper-german)

Ankaŭ la dua represo de *Historio de la esperanta literaturo* estas elĉerpita ĉe la eldoninto, Kooperativo de Literatura Foiro; la oficiala prezento de la tria represo de HEL okazos 21 jul en Junulara Arta Renkonto Transnacia ĉe la “literatura brunĉo”. (HeKo)

**La eldonanto kaj la redaktoro de “La Ondo de Esperanto”
planas partopreni en la 33a ARKONES
kiu okazos la 22-24an de septembro 2017 en Poznano
<http://www.arkones.org/eo>**



Ĉi-kajere Dennis Keefe daŭrigas sian artikol-serion pri merkato kaj Esperanto. Lia dek-tria artikolo estas dediĉita al la merkata nocio “Firmao-al-Firmao” (FAFO) – la Esperanta ekvivalento de la angla “Business-to-Business Marketing” (B2B). Ligiloj al la pli fruaj tekstoj estas troveblaj fine de lia dek-dua artikolo en nia novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2015/07/keefe-6/>

FAFO-Merkatiko kaj ĝia limigita apliko al la Esperanto-Movadoj

de Dennis Keefe

En mia serio de artikoloj pri merkato kaj Esperanto mi provadas trovi partojn de tiu studokampo, kiuj povas rilati al la Esperanto-movadoj, kaj kiuj povas helpi al individuaj esperantistoj pli bone kompreni la informadon, komunikadon, reklamadon kaj varbadon de Esperanto. Tia informado kaj konvinko-strategioj rilatas ne nur al la lingvo kaj al la Esperanto-movadoj, sed ankaŭ al iliaj rilato-partoj kiaj la vendado de Esperantaj libroj, la membriĝo kaj kotizo-pago de Esperantaj asocioj, la aŭskultado de verdaj radioj, la vendado de Esperanta muziko, kaj la starigo de eventoj: kongresoj, konferencoj, Lingvaj Festivaloj, por mencii nur kelkajn.

Ĝis nun, mi skribis ĉefe pri la merkataj subfakoj kiuj rilatas la parton de merkato kiun oni nomas en la angla lingvo *Consumer Marketing*, kaj kiun ni povas nomi Merkato por Konsumantoj. Sed nun mi volas pli detale prezenti alian subfakon de merkato kiu nomiĝas en la angla *Business-to-Business Marketing*, kaj kiun ni povas nomi Firmao-al-Firmao-Merkato, mallongigite FAFO.

La vortumado de tiuj du subfakoj estas iomete peza, do por la celoj de ĉi tiu artikolo, ni uzos la mallongigitajn formojn FAFO (Firmao al Firmao), kaj FAKO (Firmao al Konsumanto). En ambaŭ kazoj, ni komencas per firmao. La firmaoj vendas siajn varojn aŭ prezentas siajn servojn al klientoj, individuaj (FAKO) aŭ kolektivaj (FAFO).

Firmaoj povas esti komercaj entreprenoj kiel ekzemple Apple por saĝtelefonoj, Nike por sportŝuoj, Coca Cola por trinkaĵoj, Toyota por veturiloj, ktp.

Ĝi estas demonstra versio de la 68-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

TEJO memstara



Jure TEJO estis fondita kiel aparta organizo en 1989, kaj en 2007 ĝi estis registrita en la komerca ĉambro kun parta jura personeco. Tiam TEJO jure ekzistis memstare, nepra kondiĉo por, ekzemple, ricevi eŭropajn subvenciojn. Tamen la Regularo pri TEJO asertis ke TEJO ne havas juran personecon, kaj la Statuto de UEA difinis, ke TEJO estas integra parto de UEA. Estis gravaj malkongruoj kaj necesis ilin korekti. Tiuj malkongruoj fakte jam perdis al TEJO subvenciojn (kelkdek milojn da eŭroj) plurfoje en ĝia historio.

En 2013 la Komitato de UEA starigis laborgrupon pri la jura situacio de TEJO por restrukturi la rilatojn kongrue kun la bezonoj de TEJO pri subvencioj kaj eksteraj rilatoj, sen fakte disigi la du organizojn. En la sekvaj jaroj tiu laborgrupo, la Estraroj (kaj aparte la prezidantoj) kaj la Komitatoj havis diversajn okazajn debatojn pri la Statuto de TEJO kaj la Regularo pri Kunlaboro inter UEA kaj TEJO ĝis ilia vastplejmulta aprobo en julio 2016.

Laŭ tiu kadro TEJO restas la junulara sekcio de UEA, la individuaj kaj aligitaj membroj de TEJO restas la junaj individuaj kaj aligitaj membroj de UEA, la sidejo restas komuna en la Centra Oficejo kaj la rilatoj inter la du organizoj ŝanĝeblas nur per konsento de ambaŭ flankoj. Krome laŭ la Regularo pri Kunlaboro, UEA daŭre devus subteni TEJO per diversaj administraj kaj financaj servoj kaj siaflanke UEA gardas plejparton de la membrokotizoj de la junaj membroj.

Tiu reformo estis la okazo ankaŭ en TEJO de aliaj gravaj ŝanĝoj, ekzemple la aligo de la TEJO-aĝlimo de 29 al 35 jaroj kaj la enkonduko de senpaga membro-kategorio Junaj Amikoj de Esperanto.

La novaĵo estas ke la Statuto de TEJO estis notarie plenumita kaj tiel la organizo akiris plenan juran personecon. Tio signifas ke TEJO rajtas posedi registritajn havaĵojn, ekzemple ĝi nun ekhavis propran bankkonton.

La premisoj inter TEJO kaj UEA estis tre bonaj, ja dum lastaj jaroj ni spertis konkretan kunlaboron en multaj kampoj kaj sukcesan dialogadon kiu portis al la ĝisnuna situacio. Krome, kvankam pluraj kernaj aktivuloj de TEJO havis dekomenca egajn zorgojn pri la elekto de Poór Veronika al la rolo de Ĝenerala Direktoro de UEA (ĜD), plejparto de la TEJO-aktivularo tre entuziasmis kaj esperoplenis je la ŝanĝo en la posteno.

Bedaŭrinde ene de kelkaj monatoj la situacio kun la ĜD draste malevoluis, esence pro la malsama kompreno de la rolo, kiun la Direktoro kaj la TEJO-Estraro havis, nome la pretendo ke la ĜD estas supera al la estraranoj: tion la UEA-Estraro

akceptas, la TEJO-Estraro ne. Tio konkretiĝis en la malsukcesoj difini la rolon kaj la respondecojn de la ĜD en TEJO.

Je la malkonsentoj kun la TEJO-Estraro, ŝi regule sin turnis al la prezidanto de UEA, petante lian intervenon por defendi ŝiajn poziciojn. Tio bedaŭrinde iel fendis la rilaton inter Mark Fettes kaj TEJO, kio ĝis pasinta jaro estis fortika akso de la kunlaboro. Menciindas cetere ke tiujn malkonsentojn la ĜD regule esprimis per lamentoj, minacoj pri forlaso de la posteno kaj obsedo pri aserto de sia propra aŭtoritateco. Pripensindas, ĉu tia sinteno estas adekvata por ĉeffunkciulo de internacia organizo.

Kun la absoluta subteno de la UEA-prezidanto, la ĜD ne manigis sian malhelpon per pretekstaj blokadoj kaj prokrastoj. Dum pasintaj monatoj malrespekto de la Regularo pri Kunlaboro flanke de UEA iĝis fakte la normo, tiel ke TEJO, ekzemple, ne havis aliron al sia kontaro, al sia membraro, ne havis eblon mempagi, dum la CO efektivigis la pagojn kun monatoj da malfruo kaŭzante reputaciajn problemojn al TEJO. Kompleta listo de la problemoj bezonus artikolserion. Nur junie pluraj aferoj finfine malblokiĝis sed bedaŭrinde restas sufiĉe multaj kunlaboraj problemoj.

TEJO certe ne volas militi kun UEA kaj tre deziras konstrui taŭgan kunlaboradon kiu povu disvolviĝi sendepende je unuopulo kun kiu estas problema rilato.

Konklude: ni memoru ke la problemoj ne ŝuldiĝas al la ŝanĝoj en la jura statuso; tiuj ŝanĝoj nur helpas TEJO-n travivi la malfacilan momenton en la rilatoj kun UEA.

Michael Boris Mandirola

Prezidanto de TEJO

TEJO nun havas multon farendan kaj pripensendan (Foto: Ariel Palmer)



Jubileoj kaj memordatoj en julio 2017

4. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Helmi Dresen** (1892–1941), estona instruistino, urbestrarano en la sovetia Talino, “la animo de la estonia E-movado”. Ĉefdelegito de UEA en Estonio, kunfondinto de EAE (1922) kaj ties sekretario ĝis 1940, E-instruistino, kunaŭtoro de E-estona vortaro (1927) kaj de *Estona Antologio* (1932). Fratino de la poetino Hilda Dresen. Murdita de nazioj en 1941.

4. Antaŭ 30 jaroj mortis **Tiberio Morariu** (1901–1987), rumana esperantisto dum preskaŭ 60 jaroj loĝinta en Svedio. Fondinto kaj direktoro de Rumana E-Instituto (1924-28), ĉefdelegito de UEA por Rumanio, unu el la plej popularaj Cseh-instruistoj – ĝis 1934 li instruis Eon en ĉ. 100 kursoj por ĉ. 5000 kursanoj en pluraj landoj.

7. Antaŭ 15 jaroj mortis **Bruno Vogelmann** (1909–2002), germana instruisto, entreprenisto, socia aganto kaj esperantisto. Utiligis Eon en komercaj kontaktoj kun eksterlando, presigis sur etikedoj tekstojn en Eo, en 1962 kunfondis Instituton por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), kunlaboris en la naŭlingva *Internacia komerca ekonomika vortaro* (1974, 11-lingva versio en 1990). La Esperanta versio de lia libro *La nova realismo* (1989) estas fonto por 16 nacilingvaj libroformaj eldonoj.


12. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **John Merchant** (1872–1936), angla komercisto, framasono, sportisto kaj esperantisto. Prezidanto de BEA (1922-32), prezidanto de Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj (1923-33), prezidanto de Internacia Centra Komitato de la E-Movado (1928-33), prezidanto de la Internacia konferenco por komerca helplingvo en Venecio (1923). Aŭtoro de la humurplena romaneto *Tri angloj alilande*, kiu havis kvar eldonojn (1912, 1922, 1931, 1936).

18. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Valentin Melnikov** (1957–), ruslanda kemiisto, aktivulo de “intelektaj ludoj” kaj esperantisto; poeto, tradukanto kaj recenzanto; laŭreato de pluraj literaturaj konkursoj, kunlaboranto de *Sezonoj* kaj *La Ondo de Esperanto*; tradukinto de la versromaneto *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin (2005). Vd. p. 49-58.

19. Antaŭ 15 jaroj mortis **Nikola Aleksiev** (1909–2002), bulgara ĵurnalistino, socia aganto, vicprezidanto de Bulgaria societo por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando. La ĉefa gvidanto de la E-movado en la socialisma Bulgario, prezidanto de BEA (1964-76), prezidanto de LKK de UK-48 (Sofio, 1963) kaj de UK-63 (Varna, 1978), prezidanto de MEM (1963-78), komitatano de UEA (1963-80), aŭtoro de pluraj libroj en/pri Esperanto.

28. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Dalibor Brozović** (1927–2009), kroata filologo kaj socia aganto, membro de la Jugoslavio (1986) kaj Kroatia (1991) sciencakademioj, vicprezidanto de la jugoslavia respubliko Kroatio (1990), parlamentano de Kroatio (1992-95). Prezidanto de LKK de la 86a UK en Zagrebo (2001), prezidanto de KEL (1992-2009).

Urboj de Ruslando



La vira monaĥejo de Sankta Triunuo en Tjumeno estis fondita antaŭ 400 jaroj, en 1616.

Tjumeno, komforta parto de Siberio


Malmultaj ekster Ruslando aŭdis la nomon de tiu ĉi urbo, kaj eĉ ruslandanoj ofte imagas ĝin kiel junan naftogasan urbeton, lokitan ie fore, malantaŭ la Urala montaro. Des pli grandas ĉies miro post ekscii ke Tjumeno (Тюмень) multe pli aĝas ol Sankt-Peterburgo, plejparto de la urbanoj neniam vidis naftominejon kaj lastjare ĝi estis agnoskita kiel la plej komforta urbo de Ruslando.

Pordego al Siberio

La urbonomo, kies etimologio plu restas diskutata, malkovras ĝian tjurkan devenon. Tjumeno havis antaŭulon – ĉi-loke troviĝis Ĉimgi-Tura, ĉefurbo de Siberia Ĥanuĵo. Rusaj kozakoj sub la gvido de Jermak en 1582-1585 venkis la ĉefajn militfortojn de la Ĥanuĵo, sed la atamano mem pereis en nokta surprizatako de la tataroj, kaj liaj malmultaj postvivintaj kamaradoj retiriĝis al Ruslando.

Tamen antaŭ sia morto Jermak sendis al la caro Johano la 4a (konata kiel Ivano la Terura) kozakojn kun donacoj de la konkerita Siberio. Do jam la sekvan jaron venis nova tricentkapa taĉmento, kaj la 29an de julio 1586 ĝiaj estroj Vasilij Sukin kaj Ivan Mjasnoj fondis Tjumenon – la unuan rusan urbon en Siberio.

Ĝi aperis proksime de la detruita tatara ĉefurbo, ĉe la enfluejo de rivero Tjumenka al la pli granda rivero Tura. La kozakoj rapide konstruis lignan fortikaĵon, kies du flankoj estis protektitaj per krutaj riverbordoj, kaj la trian fermis barilo el pintigitaj traboj kun observoturoj kaj pordegoj. Tiuj klopodoj ne estis vanaj – dum sia unua jarcento la juna urbo estis plurfoje atakata de la tataroj kaj kalmukoj, kiuj esperis forbalai la alvenintojn. Alia minaco estis incendioj, kies fajromaro ofte inundis la urbon. Sed Tjumenon kun sia unika situo estis tre grava por Ruslando, kaj obstinaj rusoj ĉiam restarigis kaj pligrandigis ĝin.



Ĝi ne havis altan administran statuson. Nur en la unua vivojaro Tjumenio estis la ĉefurbo de Siberio, jam en 1587 ĉi tiun titolon transprenis Tobolsko. Tamen Tjumenio ĉiam estis la ekonomia centro de la regiono, kie koncentriĝis metiejoj, fabrikoj, transporto kaj komerco.

Tri ŝtatestroj

Inter la plej gravaj eventoj de la loka historio estis vizito de la grandprinco Aleksandro Nikolajevič en 1837. La estonta imperiestro Aleksandro la 2a faris tiujare longan vojaĝon tra la tuta imperio laŭ ordono de sia patro Nikolao la 1a, kiu deziris ke la filo persone konatiĝu kun la regota lando. La grandprincon akompanis lia edukisto Vasilij Ĵukovskij, fama verkisto kaj poeto, kiu klopodis enkapigi al la junulo humanismajn kaj liberalajn ideojn. Apenaŭ Lia Moŝto rememoris poste la foran siberian urbeton, sed por la tjumenanoj tiu vizito estis tiom memorinda, ke ili donis la nomon de la princo Aleksandro al ĉiu fieraĵo, ĉu lernejo, ĉu kapelo, ĉu akuŝejo.

En 1917 la urbon denove vizitis persono el la cara familio. Sed se antaŭafoje temis pri la estonta imperiestro, ĉi-foje al Tjumenio venis imperiestro estinta, kiu ekde sia abdiko la 2an de marto 1917 nomiĝis Nikolaj Aleksandroviĉ Romanov. La iama Nikolao la 2a tiutempe estis tre malpopulara. La popolo kulpigis lin pri multaj fuŝoj – la sangoverŝa kaj malsukcesa milito kontraŭ Germanio, manko de manĝaĵoj kaj varoj, politikaj reprezalioj kaj favoro al la mistikulo Grigorij Rasputin (naskiĝinta en Tobolska gubernio). Do la registaro decidis sendi al Siberio Nikolaon kune kun liaj familianoj kaj servistaro. La 10an de aŭgusto 1917 ili venis trajne al Tjumenio, kaj poste navigis per ŝipo al la gubernia ĉefurbo Tobolsko, de kie en aprilo 1918 ili ekiris al sia lasta vojaĝo – al Jekaterinburgo, kie en la kelo de la domo de Ipatjev ĉiuj estis mortpafitaj, inkluzive de la malsana 13-jara princo, junaj servistinoj kaj familia kuracisto.

Evidente tio estis la sorto de Tjumenio – ĉiam akcepti ŝtatestrojn estontajn, estintajn kaj eĉ... mortajn. Temas ne pri mistikaĵo, sed pri tute reala historia evento. Somere 1941 la faŝistaj hordoj impetis al Moskvo. Milionoj da sovetuniaj soldatoj pereis aŭ estis kaptitaj, duono de la batalteknikaĵoj estis detruita, nazioj jam vidis la Sovetunian ĉefurbon per binokloj, kaj iliaj superuloj disdonis invitilojn al solenaĵo en Kremlo. La Sovetunia registaro estis evakuita al Kuŝbiŝev (nun Samaro), Stalin restis en la urbo, tamen oni decidis garantii la sekurecon de la ĉefa sovetunia sanktaĵo – la mumio de Lenin.

Ĝi estas demonstra versio de la 68-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Antaŭ 60 jaroj, la 18an de julio 1957, naskiĝis Valentin Melnikov, Esperanta poeto, tradukanto kaj recenzanto, konstanta kunlaboranto de *La Ondo de Esperanto*, tradukinto *Eŭgeno Onegin*, vd. p. 50-58.

Valentin Melnikov jubileas

Antaŭ 60 jaroj, la 18an de julio 1957 naskiĝis Valentin Melnikov (Валентин Викторович Мельников; prononcu: Valentín Mélnikov). Li studis en la Moskva Kemia-Teknologia Instituto D. I. Mendeleev kaj en 1980 diplomiĝis kiel kemiisto-teknologo, tamen poste laboris ĉefe kiel komputisto, kaj en la malfacilaj 1990aj jaroj – eĉ kiel biletkontrolisto en busoj. Li plu loĝas en Moskvo.

Li jene rakontas pri sia esperantistiĝo:

“Ekde la lernejaj jaroj mi multon aŭdis pri Esperanto kaj revis lerni ĝin. Kial? Por almenaŭ unu fremdan lingvon ekposedi perfekte – ja rilate la naciajn lingvojn tio ne eblas. Tamen mi neniel povis trovi lernolibron, nek adreson de iu klubo. Nur en 1982 bonŝance aperis la kurso de Boris Kolker en la revuo *Himija i Ĵiznj*. Mi kaptis ĝin, kaj jam nenio povis deŝiri min de Esperanto. Iĝinte esperantisto mi kvazaŭ naskiĝis duafoje. Nenie aliloke eblas trovi tiom bonajn interhomajn rilatojn, nenie eblas vivi tiom interese. La amikeca etoso helpas evoluigi en ĉiu homo kapablojn, pri kiuj li mem antaŭe eĉ ne suspektis. En mezlernejo mi neniam havis perfektajn notojn pri literaturo – sed nun mi estas literatura recenzisto <...> Dum tiuj jaroj kelkfoje ŝanĝiĝis mia rolo en Esperantujo; finfine mi trovis min en la Esperantaj poezio kaj kulturo <...> Ni ne ĝisvivis la «finan venkon» de Esperanto, sed ni devas prepari nian lingvon, ke tiu venko iĝu ebla. Por tio gravas evoluigi nian kulturon, ke neniu povu diri, ke Esperanto estas malviva lingvo...”

Krom Esperanto, lia grava ŝatokupo estas intelektaj ludoj. Li iĝis ĉampiono de Ruslando en 2006 kaj ricevis la trian lokon en la monda ĉampionado (2003) pri la ludo “Kio?Kie?Kiam?”, plurfoje sukcese partoprenis televidajn ludojn “Brain-ring” kaj “Svoja igra” (“Propra ludo”). Lia filino Nija estas denaska esperantistino.

Liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj aperis en la libroj *La birdo Gamajun* (1989), *Moskvaro* (1998), *Lena...* (1998), *Mondoj* (2001), *Moskvaj sonoriloj* (2007), *El ombro* (2008), *Abritus* (2016) kaj en multaj Esperantaj gazetoj. Atentindas liaj satiraj poemcikloj “Socia moralo” kaj “Observoj de biletkontrolisto”, ankaŭ la lirika ciklo “Sonetoj al mia Muzo”. Iam furoris lia traduko de la maldeca poemo *Kojonov Luĉjo* (1995). Li tradukis kelkajn novelojn de Anton Ĉeĥov kaj Lev Tolstoj, faris la plej plenan kaj precizan tradukon de la versromano *Eŭgeno Onegin* de Aleksandr Puŝkin (Sezonoj, 2005), kaj tradukis plurajn verkojn de rusaj klasikaj poetoj en la ciklo *Rusa Antologio*, kiu aperis en *La Ondo de Esperanto* de 2007 ĝis 2015. Krome, li verkis grandan artikolon pri Esperanto, kiu aperis en la multvoluma ruslingva *Porinfana enciklopedio* (1998).

La Ondo de Esperanto, kies konstanta kunlaboranto li estas ekde ties (re)apero en 1991, sendas al Valentin Melnikov gratulojn okaze de la jubileo kaj deziras al li pliajn kreajn atingojn!

La Ondo

Poemoj de Valentin Melnikov

el Sonetoj al mia Muzo

VII

De homamaso fore, en izol',
obsedas min serena hela tristo:
La sorto de «poeto sen popol'»
neeviteblas por esperantisto.
Jen – iu parkerigis kun bonvol'
dek ses regulojn laŭ konata listo
por elementa skribo kaj parol'.
Sed estas maniero de l' ekzisto
por mi la lingvo. Do ĉagrenas min,
ke mia kara samideanin'
en ĝia rego laŭnivele mezas.
Kaj eble superfluas mia pen'
la versojn zorge ĉizi por kompren',
ĉar... tutegale ilin ŝi aprezas.

el Sonetoj de Curen

II

Folio velka falas sur animon,
manifestante venon de aŭtun'.
Vivestingiĝo kaŭzas la deprimon –
ja ne revenos ĝojabunda jun'.

Kaj endas jam forlasi la kutimon
pasie boli. Trankviliĝu nun!
Ĝishorizonte vastan malproksimon
dekoras ne smeraldoj, sed latun'.

Ne plu videblas ie bela floro.
Mirinde diafanas la aer'.
Kvietas ĉio... Pasis jam somer',

trovinte la azilon en memoro.
Matena frido. Ekas nova tag'.
Folioj velkaj flosas sur la lag'.

el la ciklo “Socia moralo...”

Rusa optimismo

Ekspert' en gazeto rezonas,
kaj mi preskaŭ kredas al li:
La vivo ne tiom malbonas!
...Sed multe pli.

Iom pri honoro

Fraŭlinon oni pribabilis foje,
ke perdis ŝi honoron.
Ĉar laŭ deziro kaj inklino, ĝoje
praktikis ŝi amoron.
Do, tamen, eble vi respondi provus
(pardonu pro la moko!):
Ĉu vere la honor' situi povus
nur en *ĉi tiu* loko?

Kial oni malaprobas naturismon?

Al patrino kaj filino G.

Varmega tag'! Do serĉas ni riveron,
fuĝante de polvoza urba strato
por ĝui sunon, akvon kaj aeron
per tuta korpo en natura stato.
Jes ja, nudumi estas plej racie
en kompanio saĝa kaj bonkora,
sed iu sinjorin' laŭtradicie
sin kroĉas firme al moral' pudora:
Indigne ŝi protestas kaj akuzas
nin pri malĉasta aĉa fiintenco.
Honestas ŝi! Do certe ŝi rifuzas
nudiĝi antaŭ vir'... sen rekompenco.

Moralo de fablo

... Samtiel ankaŭ ni, libere kaj sen tim'
ĝojigas unu la alian per intim'.

Pentatoniko

Pentatoniko estas la plej antikva muzika gamo, tradicia por multaj diversaj popoloj. Ĝi konsistas el kvin tonoj: do, re, mi, sol, la.

Do

Mi kvindekjaras jam. Do tempas pesi
Atingojn de l' pasinta vivo-part'.
Ĉu faris mi sufiĉe por progresi?
Ĉu venis al kontento kaj bonfart'?
Laŭ iuj, en la viv' nur mono rolas.
Sed mon-abund' ne gvidas al feliĉ':
Ju pli vi havas, des pli multe volas,
Kaj des pli vin timigas ruiniĝ'.
Jen foje oni trafe etikedas:
Similas al peniso hom-stultec':
Duono de l' homaro ĝin posedas,
Sed ĝin elmontri estas ja maldec'.
Kaj estas ĉefa riĉ', valoro tre —
La saĝ'. Mi tion diras re kaj re.

Re

Kaj tamen mankas plena harmoni'.
Ja ŝajne — ripetiĝas histori':
Ordonas la ŝtatestroj blinde kredi,
Raci' al religio devas cedi.
Makabra mezepok' reproksimiĝas,
Por civiliz' neklaras la futur'.
Pensem' kaj saĝo tute malprestiĝas...
Ĉu venkos lum' racia, ĉu obskur'?..
Se estas jen ripeto — do probablas
Post mezepoko nova renesanc',
Al civilizo — por pluvivo ŝanc'.
Sci' estas forto! Venki ĝi kapablas
Eĉ kontraŭ la stultec-epidemi'...
Do tamen restas la esper' en *mi*.

Ĝi estas demonstra versio de la 68-paĝa julia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Literatura konkurso *Liro*-2017

La redakcio de La Ondo de Esperanto denove invitas al la tradicia literatura konkurso *Liro*. Same kiel en la du lastaj jaroj, ankaŭ en 2017 la konkurso havos nur tradukajn branĉojn.



Por *Liro*-2017 estas proponataj du tradukendaj verkoj:

1. Traduko el la angla: *To the Man on the Trail* – novelo de Jack London;

2. Traduko el la rusa: *Obruĉ* – novelo de Fjodor Sologub.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*:

<http://esperanto-ondo.ru/lnd-liro.htm>

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn aŭ komputile kompostitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la retadreso sezonoj@yahoo.com.

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 31a de decembro 2017.

La laŭreatoj (unu en ĉiu branĉo) ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizantoj ĝis la 1a de januaro 2021 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono. La plej bona traduko de la novelo de Jack London aperos en la antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*.

Bonŝancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*-2017

Gazetoj ricevitaj en junio

Dia Regno, 2017/1; Esperanto aktuell, 2017/2; Esperanto, 2017/5; Informilo por Interlingvistoj, 2016/4; Israela Esperantisto, 2016/162-2017/163; Juna Amiko, 2017/2; Kontakto, 2017/1; La Brita Esperantisto, 2017/982; La Revuo Orienta, 2017/6; La KancerKliniko, 2017/162; Monato, 2017/5; Norvega Esperantisto, 2017/2.

Mozaiko

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.



Pri kiu temas?

En ĉi tiu konkurso Valentin Melnikov verse prezentas dek konatajn esperantistojn, kaj via tasko estas diveni la nomojn de la prezentatoj. Post aperigo de dek versportretoj ni resumos la rezulton. La plej sukcesa divenanto ricevos ekzempleron de la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, kiun ĉi-aŭtune eldonos *Sezonoj*.

Valentin Melnikov

Versportreto 10

*Vi vane irus nun al librobreto:
“La Ondo” jam fariĝis bit-gazeto.
Tendenco jen totala kaj fatala:
ĉirkaŭas nin la mondo virtuala.
Sed tiun mondon nia homo regas,
li en diversaj sferoj laboregas.
Progresas la afer’ vikipedia,
centmiloj venas jam al lingvo nia
per Duolingo. Ankaŭ por Ludisto
heroo nia agas kun persisto.*

La respondoj atingu la redakcion antaŭ la 15a de septembro 2017.

Respondoj

Nur kvin respondoj venis al la oka versenigmo de Valentin Melnikov. Senerare konstatis, ke temas pri **Jorge Camacho** (pli frue konata kiel Georgo Kamaĉo), ĉiuj respondintoj: Malcolm Jones (Britio), Anne Jausions (Francio), Paweł Fischer-Kotowski (Nederlando), Russ Williams (Pollando), Anastasia Otsterchil (Ruslando).

Dankon!

En junio ni pasigis unu semajnon en la Centra Oficejo de UEA (CO) en Roterdamo, laborante pri la enciklopedia projekto *Nia Diligenta Kolegaro*.

Ni kore dankas al la Ĝenerala Direktoro de UEA Veronika Poór, al la CO-oficistoj Tobiasz Kaźmierski, Rob Moerbeek, Ionel Oneț kaj Stanka Starčević, kaj ankaŭ al Paweł Fischer-Kotowski, Nikola Rašić, Alessandro Bonfanti kaj Pierre Vittet, kies helpo faciligis niajn laboron kaj restadon en Roterdamo.

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Sufiĉas jam rilatoj!

TEJO dungas eksterrilatan oficiston (Titolo de <http://sezonoj.ru/2017/06/tejo-8>, 19 jun 2017)

Kiel ĉesas komisionano

Mi finiĝas per kelkaj versoj de la fama Zamenhofa Preĝo sub la verda standardo, kiu bone esprimi bone la internan ideon... (Zamenhof – antaŭulo de homaj rajtoj, parolado de Vytenis Andriukaitis, 3 jun 2017, https://ec.europa.eu/commission/commissioners/2014-2019/andriukaitis/announcements/speech-german-esperanto-conference-freiburg-germany-3-june-2017_en)

Horora ĥoro

Internazia koruso (<https://www.pinterest.com/pin/498562621227583575>)

Lernu la grekan, uzu la fokon

La maniero, laŭ kiu nuntempe oni instruas la klasikajn lingvojn ĝenerale fokuziĝas pri gramatikaj reguloj... (Programo de la AMo-Seminario en Teruelo, <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/342>)

Felisa malsepulto

Esperanto-kulturo ekster Esperantujo <...> “elkatatombigo”, laŭ la vortigo de Miguel Fernández. (<http://www.esperanto.es/hef/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/341-esperanto-kulturo-ekster-esperantujo>)

Anonimaj aktivuloj

... la Esperanta Civito evitas <...> produkti burokratojn kaj salajratojn. Tamen, ne mankas aktivuloj: ili oficas hejme, kiel buralistoj <...> Por des pli preventi la kreon de burokrata povo, oni eĉ evitas diskonigi la nomojn de buralistoj. (*Sen burokrata povo // La eta Heroldo de KCE*, 2017, №5)

Maltardaj trompoj

Vere mi hontas paroli pri esperanto al homoj, kiuj scias pri tiu miskonduto kaj fruadoj de TEJO, UEA kaj ADJE Adjevi. (Koffi Gbeglo, 27 nov 2016, <http://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2016/novaj-malklarajoj-cirkau-la-afrika-ijk.html>; rimarkis Paweł Fischer-Kotowski)

Trejnado por dolaroj ĝisgenue

... organizi apartajn ekzamenojn nur pri la kulturaj kaj monvadaj konoj... (Stefan MacGill, Estrara Komunikado EKO 2017-14, 28 maj 2017)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paivi.saarinen@iki.fi.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarete 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!



BANSKÁ ŠTIAVNICA (SK)

15 - 23 julio 2017

Venu sperti la plej mojosoŝan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu:

<http://ses.ikso.net>

